Informilo de Majo 2019

Numero 40, majo 2019

Junaj Esperanto-parolantoj ludis elstaran rolon en UN-kunsido

Universala Esperanto-Asocio

Pruvo pri la kreskanta interesiĝo pri Esperanto inter la junularo estis tio, ke delegacio de sep esperantistoj reprezentis la junularan organizon TEJO dum la lastatempe kunveninta Junulara Forumo de EKOSOC, la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, en Novjorko. Grava atingo por TEJO estis tio, ke Rakoen Maertens, ano de tiu seppersona delegacio, estis nomita kiel ĉefparolanto dum la ferma ceremonio, kiun alparolis ankaŭ António Guterres, la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kaj aliaj gravaj UN-reprezentantoj.

La Junulara Forumo de EKOSOK estas preparforumo por la Alt-Nivela Politika Forumo pri Daŭripova Evoluigo (ANPF). En ĝi, oni preparas kaj kunordigas la agadon de junularaj organizoj kiuj agadas pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo.

Rakoen rakontas: “Ni aranĝis kunsidojn kun altnivelaj homoj en la UN-sekretariejo pri lingva politiko. Ni plurfoje kunsidis kun homoj kiuj laboras pri nova UN rezolucio (plej grava gvida dokumento de la organizo) pri lingva politiko kaj plurlingvismo. Ni nun pripensas kelkajn vojojn por plej efike influi tion, por fine enmetigi aferojn favore al Esperanto kaj niaj celoj.”

“Ni ankaŭ diskutis okazigadon de flankaj eventoj pri lingva politiko kaj lingvaj baroj, el la flanko de TEJO kune kun diversaj lingvogrupoj (parolantoj de la franca, de la portugala, ktp). La flankaj eventoj povas helpi fortigi kaj sukcesigi nian influon.”

Pri sia parolado, Rakoen rakontas: “UN aparte volis personan, inspiran rakonton, do mi parolis pri interkultura komunikado kaj kompreno. Ĵus antaŭ la parolado, mi havis la plezuron renkonti la Ĝeneralan Sekretarion de UN António Guterres. Ĉeestis mian paroladon pli ol 1000 homoj (landaj delegacioj, NRO-oj, kaj plia kvanto de homoj per viva elsendo rete).”

Legu la paroladon de Rakoen Maertens (en Esperanto) ĉe https://www.tejo.org/wp-content/uploads/2019/04/Prelego_ECOSOC_RakoenMaertens.pdf
Spektu ĝin en la angla ĉe:
https://www.youtube.com/watch?time_continue=492&v=tyrzs8QesAU

Krom Rakoen Maertens, la eventon partoprenis nome de TEJO ankaŭ Francesco Maurelli, Saŝa Murr, Sara Spanò, Marcus Griep, Hans Becklin kaj Cassidy Walker.

Aparte atentindaj estis la finaj rimarkoj de Rakoen, kiu diris jene: “Lasu min fini per unu el miaj plej ŝatataj citaĵoj, de indiĝena aŭstralianino kiu nomiĝas Lilla Watson, kiu bele kaptas la esencon de mia rakonto: ‘Se vi venis ĉi tien por helpi min, vi malŝparas vian tempon. Sed se vi venis ĉar via liberiĝo estas ligita al la mia, ni kunlaboru.’”

Post kelkaj tagoj: Simpozio pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj, Novjorko, 9-10 majo

La Studo-Grupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj invitas vin al Simpozio pri Unuiĝintaj Nacioj 75-jara: Aŭskulti, paroli kaj agadi en multlingva mondo, ĵaŭdon kaj vendredon, 9-10 majo 2019,
ĉe Church Center, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017, USA (Unua Avenuo ĉe 44-a Strato

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj estis subskribita en Sanfrancisko la 26-an de junio, 1945, kaj ekvalidis la 24-an de oktobro tiujare. Sekve, Unuiĝintaj Nacioj festos sian 75-an datrevenon en la jaro 2020. Tra la pasintaj 74 jaroj, Unuiĝintaj Nacioj laboris por (laŭ la vortoj de la Ĉarto) “savi estontajn generaciojn de la plago de milito,” “rekonfirmi nian kredon je la fundamentaj homaj rajtoj,” kaj “antaŭenigi socian progreson.”

Mallonge dirite, ĝi kreis kadron de internacia interkonsentado kaj kunlaboro, kiu, kvankam fragila kaj ofte minacata, daŭras jam tri generaciojn. Kion oni povas fari por sekurigi ĝian estontecon?

Laŭ Artikolo 1(3) de la Ĉarto, inter la celoj de Unuiĝintaj Nacioj estas “realigi internacian kunlaboradon por solvi internaciajn problemojn de ekonomia, socia, kultura aŭ humaneca karaktero kaj por antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio.”

La nuna simpozio dediĉos apartan atenton al la lingva demando. Kvankam UN jam ĉiam favoras dialogon, en lastaj jaroj ĝi fariĝis pli sentema pri la bezono de dialoga egaleco. Alivorte dirite, ĝi fariĝis ĉim pli sentema pri la neceso aŭskulti siajn publikojn anstataŭ simple paroladi al ili, kaj ne nur kompreni sed ankaŭ esti komprenata. Tiaj konceptoj fundamentas la Celojn por Daŭripova Evoluigo akceptitajn en la jaro 2015 kaj fiksintajn la tagordon de UN dum ĝia alproksimiĝo al sia centjariĝo. En mondo kie oni parolas milojn da lingvoj, ĉu UN pretas por egaleca dialogo, nun kaj estontece? Se ne, kion fari por krei lingvan pretecon – same en la interna funkciado de la organizaĵo kaj en ĝiaj rilatoj kun la pli vasta mondo? Tiuj demandoj estas aparte aktualaj en la jaro 2019, la Internacia Jaro de UN pri Indiĝenaj Lingvoj.

Ĉefaj parolantoj ĉe la simpozio estos:

Thomas Ricento. Emerita Profesoro kaj Esplorestro en la Edukada Fakultato Werklund, Universitato de Kalgario, Kanado. Fakulo pri aplika lingvistiko kun aparta intereso pri politiko kaj lingvopolitiko, lia verko Introduction to Language Policy: Theory and Method estas konsiderata kiel klasika verko en tiu fako. Granda parto de lia laboro fokusiĝas je lingvominoritataj komunumoj en Nord-Ameriko, lingvaj ideologioj kaj lingvaj vidpunktoj, kaj identeco rilate al lingvo. Li redaktis volumojn pri, i.a. lingvopolitiko kaj planado, lingvopolitiko kaj politika teorio, kaj lingvo kaj politiko en Usono kaj Kanado.

Narjess Saidane. Ambasadorino Saidane fariĝis Konstanta Observanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Organizaĵo por Frankofonio en 2017. Antaŭe (2013-17) ŝi laboris por UNDP (la evoluiga programo de UN) en ties Programo de Helpo al la Palestina Popolo, laborante tie de 2013 ĝis 2017 kiel Vica Speciala Reprezentanto de la Administranto, en Jerusalemo. Inter antaŭaj roloj estis Vica Surloka Reprezentanto por la komuna oficejo de UNDP, la Fonduso de UN pri Demografio (UNFPA) kaj la Infana Fonduso de UN (UNICEF) en Kabo Verda, kaj similaj roloj en Maŭritanio kaj en sia denaska Tunizio.

Iris Orriss. Iris Orriss rolas kiel Direktoro de Internaciigo ĉe Facebook. Ŝi laboras ĉe Facebook depost januaro 2013 kaj pasie laboras por forigi la lingvan baron ĉe Interreto. Ŝia laboro rilatas al kreskigo de Facebook en internaciaj merkatoj. Krome, ŝi estas estrarano de Tradukistoj sen Limoj, senprofitcela organizaĵo kiu specialistas pri livero de esencaj informoj en la ĝusta lingvo ĝustatempe. Antaŭ sia alveno al Facebook, ŝi estis direktoro ĉe Microsoft, kie ŝi okupiĝis pri internaciigo de produktoj kaj evoluigaj procedoj en la entreprena kaj lingvoteknologiaj departamentoj. Ŝi estas denaske germano kaj edukiĝis ĉe la Libera Universitato de Berlino.

Sponsoroj de la simpozio estas la Centro pri Aplika Lingvistiko, la Internacia Organizaĵo de la Frankofonio, ESF: Esperantic Studies Foundation, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, kaj Universala Esperanto-Asocio.

La fina programo kaj detaloj pri aliĝo troveblas ĉe www.languageandtheun.org.

Estraro de CoNGO kunvenis en Vieno kun partopreno de Universala Esperanto-Asocio

En sia rolo kiel estrarano de CoNGO (Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Kunlaboro kun EKOSOK, la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN), Universala Esperanto-Asocio estis reprezentata en lastatempa kunsido de la estraro, en Vieno, de Humphrey Tonkin, reprezentanto de UEA ĉe UN-Novjorko, kaj Hans-Michael Maitzen, reprezentanto de UEA ĉe UN-Vieno. Sur la tagordo, aldone al internaj administraj aferoj, estis preparoj por festi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de UN en la jaro 2020, kaj atento al la nuna stato kaj estonteco de la rilato inter UN unuflanke kaj la t.n. civila socio (inkluzive de neregistaraj organizaĵoj) aliflanke. UEA estis nomita al tripersona subkomitato por pluesplori ĉi-lastan demandon. La aliaj du membroj de la subkomitato estas Cyril Ritchie, vicprezidanto de CoNGO, kaj Laurie Richardson, de la virina organizaĵo FAWCO.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041
www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041